

LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŔSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—, fremdlando: bonvaluta Kĉ 25.— (5 sv. fr.) malbonvaluta Kĉ 15.— (3 sv. fr.) Konto de la ĉekoficejo Praha n-ro 34.271.

II. ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KONGRESO LIBEREC-REICHENBERG

8—9 Junio 1924

SOLENA MALFERMO

Dimanĉe la 8. Julio, je la 10:30

La Prezidanto de la Kongresa Komitato, S-ro Ing. G. Scholze, prez. de G. E. L. malfermis je la 10:30 la kongreson, salutante en esperanto la gastojn kaj dankante al la protektoroj de la kongreso t. e. al la urbo kaj la Komerca ĉambro. Liajn vortojn diris germane S-ro Taubmann kaj ĉeĥe S-ro Eiselt.

Laŭ la propono de S-ro Sklenĉka oni elektis unuanime kiel prez. de la kongreso S-rojn Eiselt Jos., prez. de ĈAE kaj Ing. G. Scholze, prez. de GEL; kiel sekretariojn de la kongreso S-rojn O. Ginz, (ĈAE) kaj K. Schüller (GEL).

Poste S-ro J. Taubmann, red. de Marto, faris festparoladon, komence esperante al la kongresanoj, post tio germane al la germanaj gastoj.

Post li S-ro Eiselt, kiel prezidanto de ĈAE faris paroladon ankaŭ komence esperante, kaj daŭrigis ĉeĥe por oficialaj reprezentantoj. En elokventa parolado li citis la ĝisnunajn kontraŭulojn de esperanto kaj iliajn motivojn kaj montris la vojojn irotajn por atingi la celon.

La kongreso aplaŭde akceptis la proponon sendi telegrafan esprimon de estimo al la prezidanto de la Ĉeĥoslovaka Respubliko, D-ro T. G. Masaryk.

En la nomo de la reprez. de la Komerca Ĉambro, D-ro A. Spitaler, salutis la kongreson en esperanto, daŭrigis germane kaj ĉeĥe, certigante pri daŭra subteno de la K. Ĉ.

Sekvis longa vico de esp. salutoj: Malfermis ĝin S-ro Hromada en la nomo de la Centra Komitato, S-ro Sklenĉka por U. E. A., S-ro Pitlik por ĈEL, S-ro Mothejzík por E. K. Praha, S-ro Král por Laborista Ligo Plzeň, S-ro Munzar por esp. en Hořice, S-ro Vojtěch por E. K. Hradec Králové, S-ro Janák por E. K. Malé Svatoňovice, Stříbrský (E. K. Kladlo), Nežil (E. K. Olomouc), S-ino Keyzlarová (E. R. Červený Kostelec), Kožený (Ml. Bolestav), F-ino Dlouhá (E. R. Praha) S-ro Horn por Nordmoravia kaj Silezia distrikto de GEL. S-ro Pivl por UEA Junulara, S-ro Dvořák (E. K. Trutnov), S-ro Kaulich (Warnsdorf), S-ro Zimmer (Litoměřice - Leitmeritz), S-ro Süsser

(Žatec-Saaz), S-ro Taubmann por distrikto Ĉeská Lípa (B. Leipa) de GEL, S-ro Klinger por E. G. Děčín-Podmokly (Tetschen - Bodenbach) kaj aliaj.

Krom la cititaj aliĝis al la kongreso samideanoj ankoraŭ el tiuj ĉi lokoj: Ujezd Podhorní, Nový Bydžov, Jablonec n./N., Jičín, Třebíč, Skřivany, Nymburk, Litomyšl, Kosmonosy, Jaroměř, Brno, Svárov, Kopidlno, Horní Růžodol, Železný Brod kaj multaj lokoj de Norda Bohemio, entute 173 personoj el 65 diversaj lokoj. Partoprenis 165 personoj (64 Ĉeĥoj kaj 101 Germanoj) el 61 diversaj lokoj de la respubliko.

Salutletoj venis inter aliaj de UEA Genève, LKK Wien, de samtempe okazanta Germana kongreso en Plauen, de Hungara kongreso Szombathely, de S-ro Cart (Paris), Rumana E-Asocio; de Komerca Ĉambro en Hradec Králové, senatoroj Hartl kaj Dr. Mayer-Harting, deputito Roscher ktp.

Post la fermo de la kunsido, je la 12a, okazis komuna fotografado, en la apuda ĝardeno.

I. LABORKUNSIDO

La 8. Junio, je la 15.30—19 horo

Post malfermo de la kunveno, prez. Scholze donas la parolon al S-ro Rud. Hromada, ĝen. sekr. de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, por paroli pri ĈAE.

RAPORTO PRI ĈAE

El la parolado, aŭskultita en streĉa atento, ni mencias: ĈAE, centra organizo de ĉeĥoslovakaj esperantistoj unuigas pli ol 1.500 membrojn, el kiuj parto grupiĝis en 30 kluboj, parto estas izoluloj. ĈAE klopodas starigi pluajn klubojn en la lokoj, kie estas sufiĉa nombro de esp-istoj. Tiel en la lasta tempo fondiĝis aŭ restariĝis novaj kluboj en Beroun, Domažlice, Holešov, Hranice, Ústí nad Orl., inter ili kelkaj speciale viglaj. Tamen multe da esp-istoj restas ankoraŭ neorganizitaj kaj malfortigas tiel la situacion de ĈAE, kiu en siaj rilatoj kun la oficoj neniam povas doni precizan ciferon de la

tuta esperantistaro en ĈSR. — La lasta ĝenerala kunveno faris gravan decidon pri financoj, fiksinte kotizon membran je 16 Kč jare (en tio 2 Kč por K. R.) La parolanto akcentas, ke en la nuna tempo de ciferoj kaj mono, neniu idealo, ankaŭ nia ne, efektiviĝas sen financa oferemo de siaj partianoj. Se nia nacia Societo Esp. devas plenumi sian ĉefan celon de organizo, la propagandadon, nepre necesa estas la mona subteno, kiu cetere, kalkulante ankaŭ la 8kronan kotizon de loka grupo, ne estas pli alta ol 2 Kč monate, do sumo, kiun eĉ malriĉa idealisto povas pagi.

Parolante pri la propagando, la oratoro prezentas koncizan revuon pri la laboroj de ĈAE de post la I. kongreso en Brno 1922. ĈAE eldonis 3000 ekz. de la ĉeĥa traduko de la raporto pri Esperanto en Ligo de Nacioj. Kune kun la flugfolio Internacia lingvo kaj aŭtoritatoj, tiu ĉi broŝuro estis sendita al eminentaj personoj de ĉs. publika vivo (ministroj, deputitoj, senatanoj, profesoroj de altaj lernejoj, verkistoj ktp.) Sekve de tio 60 eminentuloj akceptis esti membroj de Honora Komitato de ĈAE. Por daŭre informi ilin pri novaĵoj en nia movado, ĈAE sendis al ili la manifeston de 27 membroj de Franca Akademio de Sciencoj, por esperanto kaj la franclingvan broŝuron pri la Venezia Konferenco por la komuna lingvo komerca.

ĈAE presigis 24.000 ekz. de Manifesto al la instruistaro de la tuta mondo, proklamita de la Geneva Pedagogia konferenco kaj disvastigis ilin pere de gazetoj de instruistoj de popolaj lernejoj (16.000), de burĝaj lernejoj (2.600) kaj de mezaj lernejoj (4.000). Rilatoj de ĈAE kun la ministerioj estis sufiĉe oftaj: Laŭ la deziro de la ministerio de instruado, ĈAE sendis al ĝi la nomaron de 170 literaturaĵoj ĉeĥaj tradukitaj en esp-o (el kiuj du trionoj estis presitaj, parte libre, sed grandparte en diversaj gazetoj esp-istaj). En 1923 ministeria prezidio ordonis konferencon de 5 ministerioj (internaj, eksteraj aferoj, financoj, fervojoj kaj nacia defendo) por preparoli kune kun ĈAE la faciligojn por la partoprenantoj de la kongreso en Nürnberg. Atentindaj rezultatoj estis atingitaj kaj en la nuna jaro ĈAE prezentis petkskribon por atingi la samon por la kongreso en Wien.

Parolante pri la partopreno de ĈAE en la internacia movado, ili mencias la proponon de ĈAE en la konferenco Genève 1924 pri starigo de la adresaro de firmoj kapablaj korespondi esperante, ĉar ilia oficisto estas esperantisto. ĈAE helpe de siaj kluboj kaj de Delegitoj de UEA en ĈSR starigos tiun nomaron pri ĉs. firmoj por doni modelon al la aliaj Naciaj Societoj. En K. R. reprezentas ĈAE ĝia vicprezidanto, D-ro Kamaryt (Bratislava). Parolante pri la farotaĵoj, S-ro H. atentigas pri la decidoj de la Paska konferenco en Genève, instigante la reprezentantojn de kluboj interkonsili dum la kongreso pri la detaloj de ilia realigo.

RAPORTO PRI GEL

Dua raportanto, S-ro H. Klinger, kasisto de GEL kaj Vic-Ĉefdelegito de UEA en la Teritorio Ĉeĥoslovakio, parolas pri Germana Ligo Esp-ista.

Dum la lastaj du jaroj la estraro de la Ligo estis plene okupita per reorganizado de GEL, kiu estis sukcese finita antaŭ nelonge, sekve GEL nun pli povos sin dediĉi al alia laboro. Ligo forsendis al ĉiuj germanlingvaj lernejoj flugfoliojn pri esp. Komerca Ĉambro en Liberec morale, Foiro Liberec

morale kaj finance subtenis ĝin. Esp. estas nedeleviga fako en la Komerca Akademio kaj en la Ŝtata Industria lernejo de Liberec. Pere de GEL S-ro Taubmann, instruisto, ricevis forpermeson por povi fari propagandan vojaĝon en Silezio kaj Norda Moravio. GEL havas 700 membrojn, kiuj pagis la kotizojn. Ankaŭ li finas akcentante la necesecon de la organizo, ĉar petante por esperanto ĉe kiu ajn ofico, oni unue devas respondi la demandon, en la nomo de kiom da anoj la reprezentantoj parolas.

En la debato, D-ro Bischtzky (Praha) akcentas la neceson varbi la instruistaron por nia afero.

Sekve de plendo de S-ro Neužil (Olomouc), S-roj Sklenčka kaj Scholze rekomendas uzi esperanton sole en la rilatoj kun firmoj eksterlandaj, sed uzi nacian lingvon en la korespondado kun hejma firmo, eĉ se tiu ĉi korespondas esp-e.

RAPORTO PRI GAZETARA SERVO

S-ro Ginz Praha, gvidanto de la Propaganda Sekcio ĉe la Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista parolas pri la neceso, ke la sukcesoj de nia afero estu konataj al la neesperantistoj kaj pri la laboro tiurilate entreprenota.

La esperantistoj legas en sia gazetaro pri senĉesa vico da ĝojindaj sukcesoj, sed pri ili nenion aŭ tre malmulton ekscias la neesperantista publiko. Ĉar la publika opinio estas nodiaŭ kreata per la gazetaro, nia atento celu tiudirekten.

La redakcioj de nacilingvaj gazetoj mem sin ĝenerale ne okupas pri aferoj koncernantaj nian aferon kaj same ne la presagentejoj. Ofte sole la nesufiĉa informiteco kaŭzas ĉe iaj gazetoj malfavoron. Livero de la publikigota materialo estas do tasko de la esperantistaro.

La konferenco en Genève okupis sin pri ĉi tiu demando, ekkonis ĝian signifon kaj rekomendis organizatan kaj sisteman laboron al ĉiuj Nacioj Societoj.

Ambaŭ naciaj centroj esperantistaj en Ĉeĥoslovakio organizis jam ĉi tiun laboron. Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista direktas per sia Propaganda Sekcio tiurilitan laboron de sia membraro. Per specialaj demandoj ĝi trovis la emajn kaj taŭgajn laborantojn, al kiuj ĝi komence per cirkuleroj, nun en speciala rubriko de la oficiala organo donas prespretan materialon. Krome ĝi dissendas aparte specialajn artikolojn. La membroj klopodas pri la apero de la informo eventuale per personaj rilatoj. Pri sukcesoj (eltranĉaĵoj aŭ almenaŭ datoj) aŭ malsukcesoj ili informas la centron. Pri la ĉefurbaj gazetoj, kiuj estas plej gravaj kaj en kiuj ankaŭ estis atingitaj plej bonaj rezultoj, zorgas ia centro mem.

La gazeta fako de nacia societo ne postulas de siaj membroj la serĉon de taŭga materialo, tradukon kaj verkadon de la artikoloj, por kiuj taskoj estas bezonaj multo da tempo kaj diversaj kapabloj. Donante en iliajn manojn pretan laboron, ĝi al ili ebligas disvastigi la komunikojn per kelkminuta laboro ĉiusemajna, konsistanta el simpla kopiado kaj sendo. Membroj, kiuj havas la eblon labori pli multe en tiu direkto, anoncas sin ĉe la centro, por ke ilia laboro estu utiligita en la tuta ŝtato.

La parolanto mencias la eksterordinaran gravon de peresperanta propagando, kies signifo estos grandega, kiam C. K. sukcesos aranĝi regulan gazetaran servon en ĉiuj landoj.

Li petas la kunlaborantojn en ĉiuj partoj de la ŝtato diligente sen ia interrompo daŭrigi sian agadon kaj instigas al novaj aliĝoj por ĉi tiu simpla kaj facila, sed tamen eble plej grava laboro de la izolita esperanto-propagandisto.

En la debato S-ro *Taubmann* akcentas la utilacon de persona interrilatado kun redaktoroj. Li opinias, ke informoj kun precize sama teksto ne povas esti transdonataj al diverstendencaj gazetoj. Li ankaŭ postulas, ke la anoncintaj kunlaborantoj plenumadu sian promeson kaj anoncas, ke la nomo de neakurataj aperos en oficiala organo.

D-ro *Bischitzky* (Praha) raportas pri malfacilaĵoj ĉe la germanaj gazetoj de Praha.

S-ro *Hromada* atentigas, ke ĝuste pro tio, ke ĉiam ekzistas kaj longe ankoraŭ ekzistas redakcioj malfavoraj, ni komence liveru materialon pri nia movado al gazetoj favoraj. Ni ne bezonas plu presigi *teoriajn* artikolojn pri taŭgeco de esp., sed liveri *faktojn*. Kiom pli malfacila estis la laboro de la unuaj propagandistoj, al kiuj mankis la faktoj. Kaj tamen ili laboris kun sukceso!

RAPORTO PRI UEA

Post 5minuta paŭzo, S-ro *Sklenčka* donis raporton pri sia laboro kiel ĉefdelegito de UEA por Teritorio Ĉeĥoslovakio. Lia raporto, kvankam plejparte administra, kaj kvankam preskaŭ unuhora, estis prezentita per maniero lerta kaj elokventa; spite la malfrua horo, la aŭdantaro, grupiĝinta en la antaŭo de la ĉambro, atente sekvis la parolojn de la oratoro, akompanatajn ofte per ciferoj sur tabuloj speciale pretigitaj de la Ĉefdelegito. Pro ilia intereseo ni represas la ciferojn:

Membroj de UEA en ĈSR:

Jaro	1922	1923	31/5 1924
Dumvivaj	2	1	1
Subtenantaj	2	13	6
Membroj-abonantoj	465	542	461
Membroj simplaj	185	237	210
Sume	654	893	678

Kvankam do jam en la kvin monatoj de 1924 aliĝis preskaŭ la sama nombro kiel dum la tuta jaro 1923, tamen por atingi la celatan sumon de 1000 membroj de UEA en ĈSR por 1924, estas necesa plua vigla varbado de la delegitoj, por akiri la mankantajn 322 membrojn.

Delegitoj de UEA en ĈSR:

En la jaro 1922 estis 76 lokoj kun Delegito de UEA, en 1923 la sumo altiĝis al 103 kaj ĝis la 31/5 1924 ekzistas en ĈSR 150 lokoj, kiuj havas delegiton. (Bohemio 97, Moravio 22, Silezio 10, Slovakio 19 kaj Subkarpata Rusio 2)

Li uzas la okazon por publike danki al la Esperantistaj Kluboĵoj en Praha kaj en Hradec Králové, kiuj ebligis al li vojaĝi al la konferenco en Genève kaj konatiĝi kun la aranĝoj de la Centra Oficejo de UEA. Per sprita maniero li rakontas, kiel C. O. nur iom post iom transdonadis al li partojn de sia laboro. La aŭdantaro havis bonan impreson, ke Ĉeĥoslovakia Teritorio administras mem, pere de S-ro *Sklenčka*, grandan parton de la laboro. En tiu ĉi jaro 82% da aliĝiloj pasis tra la manoj de la Ĉefdelegito kaj sole 18% da Delegitoj rilatis senpere kun la C. O.

Neiŝonge antaŭ la 19 horo la kunveno estis finita, post longa aplaŭdo al la senlaca laboranto.

II. LABORA KUNSIDO

Lunde, la 9an, je la 10.45 horo.

Malferminte la kunvenon, S-ro Scholze salutas la solan eksterlandan gaston, D-ron Inĝ. *Lindt* en Zittaŭ (Saksujo) kaj transdonas la parolon al S-ro *Pittlik*, kiu prezentas raporton pri la ĝisnunaj laboroj de ĈEI, konataj al niaj legantoj el la oficialaj raportoj de ĈEI, publikigitaj en La Progreso.

S-ro *Taubmann* raportas pri la fondiĝa kunveno de la ŝtate ekzamenitaj germanaj esperanto-instruistoj. Ĝis nun ilia nombro estas 55 kaj el tiuj aliĝis 33 al la ĵus fondita sekcio ĉe GEL. Ankaŭ la ĉeĥaj ekzamenitaj instruistoj organiziĝis, fondinte sekcion ĉe ĈEI, kiu havas 23 membrojn. La ambaŭ sekcioj proponis la jenan rezolucion, kiu estis, post iu debato, unuanime akceptita:

„Ĉar esperanto helpas la popolan klerigon kaj alportas ankaŭ gravajn kulturajn kaj ekonomiajn utilojn, la II. Ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso petas la registaron ĝenerale enkonduki instruadon de esperanto en la lernejoj.“

La debaton partoprenis S-ro Neužil (Olomouc), F-ino *Tham* (Vrchlábí-Hohenelbe), D-ro *Bischitzky* (Praha), S-ro *Hromada* (Praha) kaj S-ro *Taubmann* (Bor-Haida).

Sekvas la raporto de S-ro *Sklenčka* pri la aranĝo de la *administra kurso por delegitoj* de UEA;

„Lundon (9a-10a horo) kunvenis 25 Delegitoj de UEA kaj kandidatoj je delegito por aŭskulti la administran kurson aranĝitan de Ĉefdelegito. S-ro *Sklenčka* detale klarigis la administran procedon de varbado, aligado kaj re-aligado de membroj, donis utilajn konsilojn pri propagando, tiel ke unu sola horo estis bonege uzita por plena akordiĝo de la laboroj de Delegitoj kaj Ĉefdelegito.“

S-ro *Bruno Gahler* raportis pri la kunvido de UEA-Junularo. En la debato oni rekomendis, ke tiu ĉi organizaĵo de junaj samideanoj volu ŝanĝi sian nomon, ĉar eĉ spertaj samideanoj deklaris, ke la nomo estas por ili konfuziga, igante pensi, ke temas pri iu junulara sekcio de UEA. S-ro *Gahler* promesis, ke pri la afero traktos la kunveno de ilia asocio en Wien.

S-ro *Kreibich* el Kladno sendis al la kongreso skribaĵon, en kiu li plendas pri la troo da financaj postuloj, kiuj, laŭ li, forpelas el niaj vicaj idealistoj.

S-ro *Hromada* uzas la okazon por denove atentigi pri la vidpunkto, kiun unuanime akceptis la ĝenerala kunveno de ĈAE kaj kiu akcentas, ke ni devas atente distingi inter idealismo de paroloj kaj idealismo de mono. *Ĝuste pro tio, ke ni estas idealistoj, ni devas liveri financajn rimedojn por realigi nian idealon.* S-ro *Kreibich* estas prava dirante ke ni ne perdu nin en multaj organizaĵoj, sed minimuma devo de ĉiu esp-isto estas: esti organizita en sia Nacia Asocio kaj en Universala Esperanto-Asocio.

S-ro Inĝ. *Kroužil* (Brno) sendis al la kongreso la proponon ke ni penu realigi du celojn: ĝeneralan enkondukon de esp. en ĉiuj lernejoj de la Ĉeĥoslovaka Respubliko kaj 2) Pacan universitaton en Praha.

Al la unua punkto respondas la rezolucio de instruistoj, la dua punkto estos transdonita, laŭ la propono de D-ro *Bischitzky* al la Esperantista Sekcio ĉe la Paca Societo *Chelčický* en Praha.

La prezidanto atentigas pri la nova lernolibro de esp., verkita de F-ino *Šupichová* kaj eldonita de firma Svatopluk Hrnčič en Nymburk (po 2.40 Kč).

Por resumi la laboron kaj la opiniiaron de la kongreso, la kunsido akceptas la jenajn deziresprimojn, proponitajn de S-ro Hromada:

I. DEZIRESPRIMO

La II. ĉeĥoslovaka kongreso esperantista en Liberec-Reichenberg la 8-9 Junio 1924 aŭdinte la raportojn pri la nuna stato de la esperanto-movado en nia respubliko, akcentas la devon de ĉs. esperantistoj efektiviĝi la deziroj de la Ĝeneva konferenco de K. R. kun UEA, Paske 1924, kaj proklamas, ke estas devo de ĉiu klubo:

1. aranĝi aŭtune propagandan semajnon por sisteme kaj laŭplane atentigi kiel eble plej grandan parton de sia samurbanoj pri nia afero, por ke la kursoj estu plej efikaj.
2. organizi en oktobro-novembro specialajn kursojn por komercistoj, laŭ la propono de S-ro Edmonds en Ĝenevo kaj laŭ la plano prezentota de ambaŭ Naciaj Societoj, t. e. ĈAE kaj GEL
3. starigi liston de komercaj kaj industriaj firmoj kaj publikaj oficoj, kiuj estas kapablaj korespondi en esperanto, ĉu pro tio, ke ilia posedanto aŭ iu oficisto estas esperantisto aŭ pro tio, ke ili ricevis de iu esperantisto certigon, ke li zorgos pri ilia esp. korespondado.
4. zorgi, ke per sendado de regulaj informoj al ĈAE kaj GEL tiuj ĉi du centroj posedu detalan kaj fidindan materialon statistikan pri la kursoj, paroladoj, oficiala instruado de esperanto, mallonge pri ĉio rilatanta la movadon.

II. DEZIRESPRIMO

La II. ĉeĥoslovaka kongreso konsiderante la gravan laboron farotan, por kies plenumo la koncentrigo de ĉiuj fortoj estas necesa, faras alvokon al ĉiuj esperantistoj de nia respubliko, ke ili aliĝu al U. E. A. kaj al sianacia Asocio, aŭ senpere, aŭ pere de loka klubo.

S-ro Tyř el Nymburk informis, ke oni ne permesas al la fervojistoj porti esp. insignon dum deĵoro, kvankam temas pri insigno montranta lingvan scion kaj ne iun politikan anecon. Ambaŭ Naciaj Societoj, Asocio kaj Ligo, intervenos ĉe la ministerio de fervojoj.

En la fino S-ro Taubmann dankis en la nomo de la germanaj samideanoj al la Loka Kongresa Komitato kaj precipe al S-ro Ing. Scholze pro ilia laboro, aldonante dankojn al S-inoj kaj F-inoj de lokaj grupoj pro ĉarma florumado de la kunsidejo. Efektive la tabloj dronis sub amaso da belaj okulojn ravantaj floroj. S-ro Hromada aliĝas al la dankoj en la nomo de ĉeĥaj partoprenantoj.

La kongreso finiĝis.

Vi parolas pri centmiloj da esperantistoj, pruvu, ke ili estas almenaŭ dek mil. U. E. A. bezonas 10.000 membrojn kaj atendas ankaŭ VIAN aliĝon.

DOPIS VÝZNAČNÉ OBCHODNÍ KORPORACE O ESPERANTU

V Hradci Král., dne 6. června 1924.

Pan

Otto Skleněka, hlavní zástupce UEA
v Hradci Králové.

Děkujeme Vám za oznámení o II. československém sjezdu esperantském, který se bude konati ve dnech 7.—9. t. m. v Liberci a budeme Vám povděční, ráčíte-li sjezdu tlumočiti náš vřelý pozdrav s upřímným přáním úspěšných výsledků jednání sjezdového. Jsme přesvědčeni o tom, že cílevědomá a vytrvalá práce propagátorů esperanta musí míti dobré výsledky, protože jde o věc dobrou, která zajisté má dosti síly, aby překonala mezidobí nedůvěry, kritických úsudků a pohodlnosti, které dosud rychlému rozšíření mezinárodní řeči esperanta jsou na překážku.

Přesvědčili jsme se z praktického uplatnění naší překladatelské kanceláře o tom, že esperanto, byť dosud v malé míře, přece jen s určitou pravidelností počíná se řaditi k ostatním jazykům, ve kterých děje se korespondence v mezinárodních stycích obchodních a nepochybujeme o tom, že tento počátek ve svém dalším vývoji bude znamenati tak hojně rozšíření a uplatnění esperanta, které vsuktku svým významem pro mezinárodní obchod si zaslouží.

Jsme s projevem přátelské úcty

Obchodní, živnostenská a průmyslová ústředna
v Hradci Králové.

Předseda:
Dr. Fr. Ullrich.

Tajemník:
Dr. Jar. Tobiáš.

Traduko el la ĉeĥa:

En Hradec Král., la 6-an de junio 1924.

Al sinjoro

Otto Skleněka, ĉefdelegito de UEA

en Hradec Král.

Dankante al vi pro la informo pri la II-a ĉeĥoslovaka kongreso esperantista, kiu okazos en Liberec dum 7.—9. nuna, ni estos al vi dankemaj, se vi bonvolos al la kongreso transdoni nian varman saluton kun sincera deziro de sukcesplena rezultoj al la kongresa traktado.

Ni estas konvinkitaj, ke la celscia kaj persista laboro de la propagandistoj de esperanto devas alporti bonajn rezultojn, ĉar temas pri afero bona, kiu certe enhavas sufiĉe da forto por pasigi la tempon de malkonfido, de kritikaj prijuĝoj kaj de oportuneco, kiuj ĝis nun malhelpas la rapidan disvastiĝon de esperanto.

Ni konvinkiĝis laŭ la praktika valorigo de nia traduka oficejo, ke esperanto, kvankam ĝis nun malvaste, tamen jam kun certa reguleco, aperas inter aliaj lingvoj, en kiuj oni korespondas en internaciaj interrilatoj komercaj kaj ni ne dubas, ke tiu ĉi komenco daŭros evoluigi al tiom granda disvastiĝo kaj valorigo de esperanto, kiom tiu ĉi lingvo pro sia valoro por la internacia komerco meritas.

Komerca, metia kaj industria centrejo en Hradec Králové.

La presidento:
Dr. Fr. Ullrich.

La sekretario:
Dr. Jar. Tobiáš.


LITERATURO


Inĝ. J. SITKO:

REVEKIGO DE LA NATURO

La longa, vere siberia vintro jam baldaŭ pasos, sed ankoraŭ ĉie en la naturo regas tombosilento. La tuta valo kun siaj arbaroriĉaj deklivoj estas ankoraŭ kovrita de densaj nebuloj, tra kiuj oni vidas sole intertempe kvazaŭ fantome flugantan frugilegon, avide serĉantan sian nutraĵon.

Sed baldaŭ la suno, la eterna fonto de ĉiu vivo en la naturo, trapenetas la nebulon, kaj ĝiaj varmigaj radioj liberigas la rivereton, en kiu la fiŝetoj denove komencas sian viglan vivadon. Samtempe la sunradioj forigas la neĝokovrilon de la herbejo kaj elsorĉas al la tero la unuajn floretojn, la galantojn, por ke ili sonorigu per siaj blankaj sonoriletoj al la tuta naturo, ke la printempo jam baldaŭ alvenos. Kaj super la herbejo alten, kvazaŭ ĉielen flugas la kantrakedo de la naturo, la alaŭdo, kaj kantante ĝi anoncas al tuta valo, ke la printempo estas jam revenonta. Sur la rando de la arbaro, sub arbeto ankoraŭ senfolia, modeste levas sian bluan kapon al velka foliaro la violo, kaj allogas per sia agrabla bonodoro diversajn insektojn, por ke ili prizorgu ĝian fruktigon; kaj sur la arbeto aŭdigas la turdo siajn mallongajn agrablajn melodiojn. Kaj jen sur la alia flanko de la valo, sur la plej alta branĉo de kverko sidas nigra merlo, kvazaŭ eĥe respondante al turdo per sia dolĉa flutsimila kanto. Baldaŭ sekvas ankaŭ la multenombra gento de silvioj, precipe la nigrakapuloj, kiuj nun sur la jam verdigantaj arboj ekzercas siajn laringetojn. Ĝi estas simila kiel en homa koncerto: la plej diligentaj muzikistoj venas la unuaj, por ke ili provu siajn instrumentojn. Ĝis fine alvenas la kapelestro, la najtingalo. Nun eksonas la plej bela koncerto, aŭdebla en la naturo. La najtingalo kantas el koro al koro, ĝi kantas pri amo. Ŝajnas, ke iu nekonata forto dissemas la amon en la tuta naturo: ĉiu floreto ĝin elspiras per sia bonodoro kaj ĉiu birdeto ĝin esprimas per sia kanto.

Iru en la naturon, aŭskultu kaj lernu aŭdi, rigardu kaj lernu vidi, vi estos riĉe rekompencataj kaj neniam seniluziigataj.



JAN NERUDA:

AL LA PATRINETO

(Matiĉce. El „Libroj de versaĵoj“.)

Ĉiun senton nur silente
portas mi en mia koro,
eĉ la panjon mi sciigas
nek pri ĝoj' nek pri doloro.

Kio kaŭzas, mia panjo,
ke vi tamen ĉion vidas —
kiam ĝojas mia koro,
ke okuloj viaj ridas?

Kio kaŭzas, mia panjo,
ke vi ĉion klare vidas —
kiam ploras mia koro,
ke vi en' angul' eksidas?

El la ĉeĥa trad. Miloš Lukáš.



JAN NERUDA:

KONSOLO

Se vana estas via pen',
vin ne fordonu al ĉagren'!
Ne sekvas volon tuj plenum';
Biblio jam atestas,
ke Dio diris: „Estu lum'!“
kaj lum' — ĝis nun ne estas!

Tradukis M. Lukáš.



JAROSLAV VRCHLICKÝ:

JASMENO

Da jasmeno tuta maro!
Ĉie sur trunket' sin tenas
sorĉ-odora flora paro...
Feston oni ĵus solenas
en la domo de l'najbaro.

Eksilentis la gitaro,
gastoj gaje nun festenas;
ĉiujn logas la arbaro
de jasmen'.

Pastron tostas la gastaro:
ĵus kun ĉambrestin' li venas.
Jen ĉe li sur la talaro
(oni certe jam divenas!)
kaj en ŝia or-hararo —
la jasmen'...

Libere tradukis M. Lukáš.

NOVA EŬROPO

LA VIRINOJ EN ĈEHOSLOVAKA RESPUBLIKO

Verkis Františka Plamínková. El la ĉeĥa
manuskripto tradukis Marie Cimrová.

(Daŭrigo)

SUKCESOJ EN LEĜODONADO

En la antaŭaj artikoloj ni parolis pri la reformoj aŭ sukcesoj atingitaj ĝenerale — do ne sole per maniero leĝa, sed ankaŭ per maniero administra aŭ eventuale enkondukitaj efektive (via facti). En tiu ĉi parto objekte ni notas aŭ sole koncize analizas kelkajn leĝojn, kiujn oni efektivigis en la respubliko per kunlaboro de virinoj balotantaj kaj elektitaj, la leĝojn rekte koncernantajn la virinojn aŭ infanojn.

Per leĝo de 19./12. 1918 estis reguligita la 8hora laboro. La leĝo enhavas kelkajn ordonojn rilate la virinojn. Ilia laboro (escepte kelkajn nomitajn entreprenojn) devas ĉesi sabate je la 2. horo posttagmeze, kontraŭe tiu de viroj pli malfrue.

Per leĝo de 15./5. 1919 estis ŝanĝita la regularo pri asekurado de laboristoj en okazo de malsano; tiuj reguloj koncernas nun ankaŭ la okupitojn en hejmoj, kaj laboristojn agrikulturajn. Per tio la virinoj de ambaŭ nomitaj kategorioj ricevas subtenon en okazo de patriniĝo.

La 22./5. 1919 estis leĝe ŝanĝitaj la reguloj pri edzeco. Estis forigita la nedisigebleco de edzeco de katolikoj; la eksedzigitaj povas denove edziĝi. La eksedziĝo aŭ disiĝo de geedzoj povas esti libervolaj (sen juĝa esploro), se la geedzoj interkonsentos pri la infanoj kaj havaĵo. Se ili ne interkonsentiĝas pri infanoj, la tribunalo aljuĝos tiujn ĉi al tiu el la geedzoj, kiu donas pli grandan garantion pri konvena eduko. La civila edziĝo estas laŭleĝe egalvalora al la eklezia.

Leĝo de 24./7. 1919 diras, ke la instruistinoj de publikaj naciaj lernejoj ne estas devigataj forlasi la oficon, se ili edziniĝas; se la edziniĝinta instruistino forlasis la oficon, ŝi ricevas monan kompensajon; se ŝi restas en la servo, ŝi havas en okazo de patriniĝo rajton ricevi plene pagitan forpermeson, 6 semajnojn antaŭ kaj 6 semajnojn post la akuŝo.

Leĝo de 12./12. 1919 pri hejmaj laboroj malebligas, pli intense ol ĝi estis dum la tempo aŭstria, profituzi per regula laboro la infanojn.

Per leĝo de 30./6. 1921 estis parte reguligita situacio de eksteredzecaj infanoj kaj de infanoj edukataj en fremdaj familioj.

La 17./2. 1922 estis leĝe reorganizita la virina faka edukado kaj reguligita la situacio de geinstruistoj en tiuj fakaj lernejoj.

Leĝo de 17./2. 1922 limigas la vendadon de alkoholtrinkaĵoj.

La leĝo de 13./6. 1922 starigas „egalecon“ de instruistinoj kun la viraj kolegoj. (Vidu ĉapitron: Rajto je laboro). Per la sama leĝo estis enkondukita deviga vizitado de kompletigaj lernejoj por knabinoj de 14. ĝis 16. jaroj.

Leĝo de 11./7. 1922 traktas pri la ekstermado de seksaj malsanoj.

Leĝo de 19./4. 1919 egalrajtigas la poŝt-oficistaron. Per tio gajnis la virinoj la samajn salajrojn kun la viroj, permeson de edziniĝo, pagitan forpermeson (12 semajnojn) en okazo de patriniĝo k. t. p.



Ĉeĥaj tipografoj partoprenis la konkurson aranĝitan de la brita presista revuo „British Printer“ en Londono. La 1an premion por la modela anonco ricevis Antonín Šírek (anonco de Národní Politika), okupita en la presejo Politika en Praha. La 3an premion ricevis Ant. Hering kaj la kvaran Mahning. Ankaŭ tiuj ĉi du laboras en la presejo Politika, kiu estas konata al esperantistaro, ĉar en ĝi estis presata Esperanto, oficiala organo de U. E. A., dum la jaro 1922, antaŭ ol ĝi — sekve de la subita supreniro de la ĉeĥa krono — transiris al samideano Göring en Magdeburg.

I. Internacia kongreso por scienca organizo de laboro okazos, kiel ni jam raportis, en la lasta n-ro, en Praha la 21–24 Julio. Ĝia protektoro estos prezidanto de Ĉeĥoslovaka respubliko, D-ro T. G. Masaryk, honora prez. H. Hoover, ministro de komerco de USA. Aliĝis jam 50 Usonanoj, pli ol 20 Poloj, 10 Sudslavoj, delegitaro itala, rumuna, franca, rusa ktp. La programo de la kongreso estas esploro de la metodoj por la rekonstruo de la mondekonomio sur la bazo de scienca analizo. Postulu detalajn informojn (skribu en esperanto) ĉe Pimco, Praha-II. Jindřišská, 3 aŭ New-York, 29 W 39 Street.

ESPERANTA MOVADO

LA XVI. EN WIEN

6.—14. Aŭgusto 1924

Lasthore ni ricevas tiujn ĉi plej novajn informojn, ĝis nun nenie publikigitajn.

